En tiu momento ŝia kapo ekpremis la plafonon. Do, sen plua prokrasto ŝi levis la oran ŝlosileton kaj rapidis al la ĝardenpordeto. Sed havante la altecon de tri metroj, ŝi apenaŭ povis, kuŝante sur la planko, rigardi per unu okulo en la ĝardenon, kaj la tasko eniĝi en ĝin fariĝis ja pli ol iam utopia. Ŝi sidiĝis kaj denove ekploris.

"Vi devas honti," ŝi diris al si, "vi granda bubino!" (ŝi certe ne eraris pri la lastaj du vortoj) "multe tro granda vi estas por plorkrii, vi tuj ĉesu!" Malgraŭ tiu akra sinriproĉo, ŝi ne ĉesis la ploradon, ĝis ŝi faligis kelkajn hektolitrojn da larmegoj, kaj etendis sin ĉirkaŭ ŝi larmlageto profunda je dek centimetroj kaj kovranta preskaŭ la tutan plankon de la halo.

Post ne longa tempo ŝi aŭdis ian piedfrapetadon, kaj vigle forviŝis la larmojn por esplori kiu venas. Jen reaperis la Blanka Kuniklo lukse vestita, havante en unu mano paron da blankaj gantoj, kaj en la alia grandan ventumilon. Jen li alvenis, trotrapide, kaj murmuris al si: "Ho, la Dukino! Se mi igos ŝin atendi, ŝi tute furioziĝos!"

Ĉar Alicio jam fariĝis preskaŭ senespera, ŝi estis preta peti helpon de kiu ajn. Do, kiam la Kuniklo sufiĉe apudiĝis, ŝi ekparolis per tre mallaŭta timplena voĉo: "Se al vi plaĉos, Sinjoro:—"

La Kuniklo forte eksaltis, lasis fali gantojn



kaj ventumilon, kaj per ĉiuj fortc
en la mallumon!

Alicio levis la gantojn kaj v
ĉar estis en la halo tre varme,
ventumadis sin kaj samtempe ba
"Hieraŭ ĉio okazis laŭrutine,
ĉio estas stranga! Ĉu dum la nok
mi esploru tion. Ĉu vere mi es
mi leviĝis hodiaŭ matene? Mi k
ke mi sentis min *iom* ŝanĝiĝinta.
estas sama, jen alia demando;
Jen granda enigmo!" Kaj ŝi
pensis ĉiujn samaĝajn knabin
konas, por certiĝi ĉu ŝi ŝanĝ
ili.

"Mi certe ne estas Ado, ĉar ŝ
sur la ŝultroj per longaj bukloj, k
tute ne bukla. Ankaŭ mi ne est
mi scias multe da lernaĵoj, kaj ŝi
malmulte. Ankaŭ ŝi estas *si*,
. . . ho, mi tute konfuziĝas! M
ankoraŭ scias la jam longe ko
Por komenci: kvaroble kvin fara
oble ses faras dektri, kvaroble
Ho, tiamaniere neniam mi a
Tamen la Multiplika Tabelo esta
ferenta; mi ekzamenu min geogr
estas ĉefurbo de Parizo, Parizo ĉe
kaj Romo. . . . Ne, denove mi

LEWIS CARROLL *La Aventuroj de Alicio en Mirlando* Esperanto translation (Illustrated by Brinsley Le Fanu) LONDON, 1910 THE BURSTEIN